# BULTENO
## DE LA INTERNACIA LABOR-OFICEJO

No 23 Junio 1927

Aperas ĉiudumonate kiel aldono al „ESPERANTO" ☆ Redaktejo: BUREAU INTERNATIONAL DU TRAVAIL, GENÈVE

TEKSTO: La XXXV-a Kunsido de la Administra Konsilantaro. — La Okhora Labortago malpliigas la morto-kvanton ĉe la Ĉeĥoslovakaj vitrolaboristo. — La Deka Kunsido de la Internacia Labora Konferenco. — Socia Leĝdono en Polujo. — Asekuro kontraŭ malsano. — Libereco por sindikatiĝi. — La Labormovado en Ĉinujo. — Nova Jarlibro pri Kooperaj Organizajoj. — Progreso pri konfirmo de konvencioj.

### La XXXV-a Kunsido de la Administra Konsilantaro.

La Tridekkvina Kunsido de la Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo malfermiĝis en Genève la 30-an de Marto. S-ro Arthur Fontaine (reprezentanto de la Franca Registaro) prezidis kaj ĉeestis ankaŭ:

**Registaraj Reprezentantoj:** S-roj Unsain (Argentino), Mahaim (Belgujo), Feig (Germanujo), Wolfe (Granda Britujo), Drake (Hindujo), Grafo de Altea (Hispanujo), S-roj Labriola (Italujo), Kasama (Japanujo), Riddell (Kanado), Thorsen (Norvegujo), Sokal (Polujo): **Mastraj Reprezentantoj:** S-roj Lecocq (Belgujo), Hodac (Ĉeĥoslovakio), Lambert-Ribot (Francujo), Forbes Watson (Granda Britujo), Olivetti (Italujo), Gemmill (Sudafriko): **Laboristaj Reprezentantoj:** S-roj Jouhaux (Francujo), Müller (Germanujo), Poulton (Granda Britujo), Simpson (Kanado), Oudegeest (Nederlando), Thorberg (Svedujo).

#### Intelektaj laboristoj.

En pli frua kunsido S-ro de Michelis, reprezentanto de la Itala Registaro, proponis la starigon de Konsulta Komitato de Intelektaj Laboristoj, kaj la Konsilantaro nun diskutis raporton de la Direktoro, favoran al la propono kaj prezentantan projekton por efektivigi ĝin. La diskuto montris, ke la propono ne estas kontraŭata principe kaj ke ĝi verŝajne efektiviĝos. La Konsilantaro decidis asigni sumon por tiu celo en la Budĝeto de 1928. La detaloj pri la konsisto de la Komitato kaj ĝiaj funkcioj estos decidataj en estonta kunsido post konsulto kun la Komitato de la Ligo de Nacioj pri Intelekta Kunlaboro, dum ĝia kunveno en Julio.

#### La Kinematografo.

La Konsilantaro konsideris alian proponon de S-ro de Michelis por la organizo de kolekto de kinematografaj filmoj pri laboro kaj decidis komisii al la Oficejo la kompilon de katalogo de tiaj filmoj.

#### La progreso pri konfirmoj.

Oni diskutis la raporton de la Direktoro pri la laboro de la Oficejo kaj notis la progreson faritan pri la konfirmo de konvencioj, interalie la decidon de la Franca Senato pri kondiĉa konfirmo de la Okhora Konvencio kaj la debaton pri la sama temo en la Brita Deputitaro. La Brita Registaro nomis komitaton por studi la demandon pri konfirmo.

#### Jaraj raportoj pri apliko de konvencioj.

Oni decidis pri la konsisto de la Komitato, kiu ekzamenos la jarajn raportojn de la Registaroj, laŭ artikolo 408 de la Packontrakto, pri la apliko de konvencioj jam konfirmitaj. La jenaj personoj estis nomitaj kiel membroj de la komitato: S-ro Jules Gauthier, S-ro Tschoffen, Prof. H. W. C. Davis, Prof. William Rappard, Prof. Gini, S-ro Quadart, S-ro von Nostiz kaj Sir Selwyn Fremantle, kun Prof. Koszembar-Lyskowski kiel anstataŭanto.

#### Komuna Mara Komisiono.

La Konsilantaro konsideris la rekomendojn faritajn de la Komuna Mara Komisiono en ĝia lasta kunveno. Oni akceptis proponon de la Kanada Registaro-Reprezentanto, por rekomendi al la sekvonta Mara Kunsido de la Konferenco la pliigon de la nombro da membroj de la Komisiono de 10 al 14 kaj la asignon de almenaŭ kvar seĝoj al reprezentantoj de eksteraŭropaj landoj.

#### Laborhoroj de maristoj.

La Konsilantaro devis decidi definitive pri la enmeto de la demando pri reguligo de laborhoroj surŝipe en la tagordo de speciala Mara Kunsido de la Konferenco, kunvenonta en 1928, laŭ la provizora decido de la Konsilantaro en ĝia 34-a kunsido.

S-ro Wolfe, reprezentanto de la Brita Registaro, diris, ke naciaj kontraktoj sufiĉas por la reguligo de labordemandoj en la komerca ŝiparo. La Brita Registaro ne kontraŭstarus konferencon celantan la internacian registradon de tiaj naciaj kontraktoj, sed ĝi malaprobas la enmeton en la tagordon de la reguligo de laborhoroj surŝipe. Sekve li proponis la prokraston de la demando ĝis la diskuto de la tagordo de la konferenco kunvenonta en 1929.

La laborista grupo kontraŭbatalis tiun proponon. S-ro Jouhaux diris, ke la postuloj de la maristoj respondas al la deziro de la tuta laboristaro kaj ke la postulo nun diskutata estas esprimita de ĉiuj maristoj, de la ŝipestroj ĝis la ŝipanoj.

S-ro Fontaine diris, ke lia Registaro estas preta por ekzameni iun sistemon, kiu certigus al maristoj justajn laborkondiĉojn. Laŭprincipe oni ne povas rifuzi al maristoj la rajtojn konsentitajn al la ceteraj laboristoj. Pri la praktikaj aspektoj de la afero, li rimarkigis, ke la pliparto de la argumentoj prezentitaj kontraŭ la reguligo de laborhoroj surŝipe estas la samaj, kiujn oni uzis antaŭe kontraŭ iu ajn reguligo de laboro en industrio. Tamen, por akiri la apogon de Granda Britujo, apogon al kiu li atribuas multegan gravecon, li proponis, kiel akordigan aranĝon, ke la Konsilantaro prokrastu la kunvenon de Mara Konferenco je unu jaro, sed definitive decidu ke tia Konferenco okazu en 1929.

La reprezentantoj de la Germana, Belga kaj Itala Registaroj parolis favore al la enmeto de la koncernata demando en la tagordon de iu Konferenco.

La mastra grupo sin esprimis kontraŭ.

Oni voĉdonis, kaj la propono de S-ro Wolfe estis malakceptita per 15 voĉoj kontraŭ 8, kun unu sindeteno.

La propono de S-ro Fontaine, por la definitiva enmeto de la demando pri reguligo de laborhoroj surŝipe en la tagordon de mara konferenco kunvenonta en 1929, estis akceptita per 15 voĉoj, kontraŭ 6, kun 3 sindetenoj. La 6 mastraj reprezentantoj voĉdonis kontraŭ la propono. Tri registaraj reprezentantoj, la Brita kaj du aliaj, sin detenis de la voĉdono. Ĉiuj aliaj registaraj reprezentantoj kaj ĉiuj laboristaj reprezentantoj voĉdonis por la propono.

La Konsilantaro aprobis la budĝeton por 1928.

## La Okhora Labortago malpliigas la mortokvanton ĉe la Ĉeĥoslovakaj vitrolaboristo.

Raporto de la Sindikato de Ĉeĥoslovakaj vitrolaboristoj donas interesajn informojn pri la mortokvanto ĉe la vitrolaboristoj en tiu lando. La ciferoj por 1926 montras, ke la meza probabla vivdaŭro de vitrolaboristoj estas iom pli ol 51 jaroj, kompare kun 47 jaroj en 1925, 45½ jaroj en 1924, 42 jaroj en 1921, 39 jaroj en 1919—1920 kaj 35½ jaroj en 1913—1914.

La raporto atribuas la pliigitan vivdaŭron al la enkonduko de la 8-hora labortago kaj la edukaj klopodoj de la sindikatoj pri higieno.

## La Deka Kunsido de la Internacia Labora Konferenco.

La Deka Kunsido de la Internacia Labora Konferenco malfermiĝis en Genève la 25-an de Majo. Sir Atul Chatterjee, Alta Komisaro de Hindujo en London, Delegito de la Hinda Registaro, estis unuanime nomita Prezidanto de la Konferenco.

Estas tri demandoj en la tagordo: Asekuro kontraŭ malsano; metodoj por starigi minimuman salajron kaj libereco por sindikatiĝi. Pri la du lastaj, laŭ decido de la Oka Kunsido lastan jaron, la proceduro per „duobla diskutado" estos uzata la unuan fojon. Laŭ tiu proceduro, demando estas prezentata duloje al la Konferenco; unufoje, por ke la delegitoj decidu la grandajn liniojn de eventuala internacia solvo kaj la punktojn, pri kiuj la Registaroj devus esti konsultataj per demandaro redaktota de la Oficejo; kaj la duan fojon, por la definitiva decido pri akcepto de Projekto de Konvencio aŭ Rekomendo.

Tio proceduro ne estos aplikata al la unua demando en la tagordo. Tiu ĉi demando estas jam diskutita en la Kunsido de 1925, okaze de la ekzameno de la raporto de la Oficejo pri la ĝeneralaj problemoj de socia asekuro. Sekve la delegitoj al la Deka Kunsido de la Konferenco estos invitataj, fari definitivan decidon pri akcepto de Projekto de Konvencio aŭ Rekomendo pri Asekuro kontraŭ Malsano.

Ĉiuj demandoj estis komisiitaj al apartaj komitatoj, kies raportoj estis diskutataj de la Konferenco, kiam tiu ĉi Bulteno estis sendata al la presejo.

## Socia Leĝdono en Polujo.

Polujo faras senĉese grandajn klopodojn en la kampo de socia leĝdono. Ĝi jam konfirmis 13 Internaciajn Laborajn Konvenciojn, entenata ĉiujn akceptitajn en Genova en 1920 kaj en Genève en 1921, kaj la naciaj leĝoj estas akordigitaj kun tiuj konvencioj. Laŭ sciigoj de S-ro Jurkiewiez. Ministro de Laboro, en la Parlamento, aliaj rimedoj estas preparataj. Leĝo-dekreto pri laborinspektado estos proklamita post nelonge. Leĝo pri la uzo de blanka fosforo estas preskaŭ preta. La Ministro ankaŭ preparas diversajn tekstojn por prezento el la Parlamento, el kiuj la plej gravaj estas: dekreto pri asekuro de intelektaj, laboristoj kontraŭ profesiaj malsanoj; leĝo-dekreto pri laborkontraktoj de intelektaj laboristoj; leĝo pri asekuro kontraŭ maljuneco kaj leĝo-dekreto pri laborkontraktoj de manlaboristoj.

## Asekuro kontraŭ malsano.

Unu el la demandoj diskutataj en la Deka Kunsido de la Internacia Labora Konferenco estas tiu pri asekuro kontraŭ malsano, kaj estas verŝajne, ke la Konferenco akceptos Projekton de Konvencio pri tiu afero.

La utilo de asekuro por la laboristo estas klara. Ĝi konsistigas tamen gravan ŝarĝon sur industrio. La bezonaj rimedoj venas tute aŭ parte de la enspezoj aŭ de la laboristaro aŭ de la entreprenistaro. Ili varias de 4 al 7 procentoj de salajroj en diversaj landoj.

Du raportoj de la Internacia Labora Oficejo estas prezentitaj al la Konferenco. La unua enhavas la rezultatojn de la Konsulto de la Ŝtatmembroj de la Organizaĵo. La dua analizas la naciajn leĝojn, iliajn efektojn kaj iliajn tendencojn. Ambaŭ raportoj kondukas al la konkludo, ke estas eble starigi internaciajn konvenciojn pri asekuro kontraŭ malsano.

La preparo de la konvencio aŭ konvencioj necesigos ekzamenon de la precipaj problemoj rilataj al la afero. La plej fundamenta demando decidota estas, ĉu asekuro devas esti deviga aŭ laŭvola. Respondante al la demandaro de la Oficejo, tri kvaronoj el la Registaroj favoris devigan asekuron. Ili estas la Registaroj de Aŭstrio, Belgujo, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Estonio, Francujo, Granda Britujo, Germanujo, Hispanujo, Italujo, Japanujo, Latvio, Luksemburgo, Nederlando, Polujo, Portugalujo kaj Rumanujo. La argumentoj por deviga asekuro estas ke, en modernaj kondiĉoj, la protekto de la sano de la laboristo estas intereso de la tuta socio, kiu ne devas lasi lin al liaj propraj rimedoj kaj iniciato. La sperto montras, ke, malgraŭ la progreso, kiun ĝi faris dum la lastaj jaroj, laŭvola asekuro, eĉ subvenciita, plej ofte instigas nur malgrandan proporcion de la laboristaro sin ŝirmi kontraŭ la sekvoj de malsano. La deviga sistemo estas la sola efika rimedo por protekti la tutan laboristaron, kaj konvencio, deviganta la Ŝtatmembrojn de la Organizaĵo akcepti tiun sistemon, estas la sola garantio, ke la financaj ŝarĝoj de malsanasekuro estu pli malpli egalaj en la diversaj landoj. La plimulto de la Registaroj ankaŭ aprobas la asekuron de ĉiuj salajruloj, sendepende de la klaso de entrepreno aŭ servo, pri kiu ili estas okupataj. Tiu ĉi principo progresas en ĉiuj landoj kaj estas la bazo de preskaŭ ĉiuj lasttempaj leĝoj pri la afero. Preskaŭ 60 000 000 laboristoj nuntempe profitas de deviga asekuro.

Alta grava punkto estas la divido de la kosto de asekuro. Tiu estas pagata ĝenerala de la asekuritoj, la mastroj kaj la Ŝtato. En ĉiuj landoj, kun escepto de Rumanio, kaj tiu escepto verŝajne ne daŭros longe. La duono de la naciaj leĝoj provizas monhelpon de la Ŝtato, kaj tiu ĉi principo certe plivastiĝos. Preskaŭ ĉiuj Registaroj sin deklaris favoraj al kotizoj de laboristoj kaj mastroj.

La profitoj rezultantaj de asekuro en la komenco konsistis ĉefe el monkompensoj pagataj okaze de nekapableco por laboro rezulte de malsano. Poste oni aldonis kuracadon. La rolo de kuracado en asekuro nuntempe fariĝas ĉiam pli grava. La aktiveco de asekuraj institucioj ankaŭ etendiĝas pli kaj pli al antaŭforigo de malsanoj. Ĉiuj registaroj, en iliaj respondoj al la demandaro de la Oficejo, esprimis la opinion, ke la decido de la Konferenco devus difini la trioblan celon de asekuro: antaŭforigo, kompenso kaj kuracado.

La Konferenco devos ankaŭ trakti la demandon pri la administro de la asekuro. Senpera Ŝtatadministro aktuale ekzistas nur en du landoj: Japanujo kaj Bulgarujo. La preskaŭ universala metodo estas administro per sendependaj institucioj, en kiuj partoprenas la koncernatoj: la asekuritaj, mastroj kaj iufoje ankaŭ reprezentantoj de la Ŝtato.

## Libereco por sindikatiĝi.

Inter la dokumentoj preparitaj por la X-a Kunsido de la Internacia Labora Konferenco estas raporto pri Libereco por sindikatiĝi, kiu estas la dua demando en la tagordo de la Konferenco.

La principo de libereco por sindikatiĝi estas speciale aludita en la Konstitucio de la Internacia Labora Organizaĵo. La antaŭparolo de la Parto XIII de la Kontrakto de Versailles, difinante la celojn de la Organizaĵo, nomas la akcepton de la principo de libereco por sindikatiĝi, kiel unu el la rimedoj urĝaj por plibonigi la kondiĉojn de la laboristoj kaj tiel forigi minacon al mondpaco. Poste, Artikolo 427 de la sama Kontrakto, pritraktante la metodojn kaj principojn por la reguligo de laborkondiĉoj, kiujn ĉiuj industriaj socioj devas peni por apliki, metas inter ili „la rajton je asociado por ĉiuj laŭleĝaj celoj same por la salajruloj kiel por la dungantoj". Do estas la Packontrakto mem, kiu devigas la Internacian Laboran Organizajon diskuti la certigon de libereco por sindikatiĝi per internacia konvencio.

Krom tiuj ĝeneralaj motivoj, ekzistas aliaj kun karaktero konstitucia. Laŭ la Parto XIII de la Packontrakto, profesiaj asocioj devas aktive partopreni en la taskoj de la Organizaĵo. En la Internacia Labora Konferenco, ĉiu Ŝtatmembro estas reprezentata de kvar delegitoj, el kiuj unu reprezentas la mastrojn kaj unu la laboristojn de la koncernata lando, reprezentantoj „elektitaj konsente kun la organizaĵoj plej reprezentaj de la mastroj kaj laboristoj en la respektivaj landoj".

Plie, la Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo konsistas el 24 membroj, el kiuj ses estas elektataj de la mastraj delegitoj kaj ses de la laboristaj delegitoj al la Konferenco. Por certigi reprezentadon laŭ tiuj principoj, estas nepre necese, ke profesiaj organizaĵoj estu liberaj. Sekve la Internacia Labora Organizajo senpere interesiĝas pri tio, ke libereco por sindikatiĝi estu garantiita de ĉiuj Ŝtatmembroj.

La problemo fariĝis pli grava per la fakto, ke la Internacia Laboroficejo ricevis plurajn plendojn pri malobservo de tiu principo. En 1920 la Hungara Registaro petis al la Oficejo, ke ĝi sendu komisionon, por enketi pri la famo tiam kuranta, rilata al la asertita persekuto de laboristoj. La Oficejo sendis komisionon, kies konstatoj estis eldonitaj en oficiala raporto. Poste, la Hispana Unuiĝo de Laboristoj plendis al la Oficejo kontraŭ la Hispana Registaro. En tiu okazo, la Administra Konsilantaro opiniis, ke ĝi ne povas enmiksiĝi, sen peto de la Registaro, ĉar ekzistis neniu internacia konvencio, konfirmita de la koncernata Ŝtato.

Tiaj okazintaĵoj kompreneble instigis la Konsilantaron ekzameni la demandon, kiel eventualan temon por internacia decido. En 1923 ĝi komisiis al la Oficejo dokumentan enketon pri la aktuala situacio en ĉiuj landoj partoprenantaj en la Organizaĵo. La sekvintan jaron, la Konferenco akceptis rezolucion, petantan la Administran Konsilantaron, ke ĝi enmetu la demandon en la tagordon de estonta kunsido. Estas rezulte de tiu rezolucio, ke la demando aperas en la tagordo de la Deka Kunsido de la Konferenco.

La provizora raporto de la Oficejo distingas inter la du principoj: „rajto por kombino" kaj „rajto por kombinata agado". Por la unua ĝi proponas la jenan formulon: „La rajto de laboristoj kaj mastroj egale por kombini por la kolektiva defendo de iliaj interesoj kiel laboristoj kaj mastroj"; por la dua la jenan: „La rajto de profesiaj kombinoj por persekuti iliajn celojn per ĉiuj rimedoj ne kontraŭaj al la leĝoj kaj reguloj observataj por la subteno de publika ordo".

---

## La Labormovado en Ĉinujo.

La *Internacia Labora Revuo* eldonis en ĝia Marta numero artikolon de D-ro Ta Ĉen, Profesoro en Tsing-Hua-Kolegio, Peking, pri la ĉinaj laboristaj sindikatoj kaj ilia agado dum la lastaj jaroj. Kvankam skribita antaŭ la rimarkinda disvolviĝo de la labormovado en Suda Ĉinujo post la venkoj de la Kantona militistaro antaŭ kelkaj monatoj, la artikolo estas tre valora. D-ro Ta Ĉen klopodas por montri la diferencojn inter la modernaj organizaĵoj kaj la malnovaj gildoj, kiuj ampleksis mastrojn kaj laboristojn. Li atentigas pri tri faktoroj en la moderna ĉina movado: la kresko de klaskonscio, la kreado de laboristaj asocioj kaj la sento pri korporacia respondeco.

Li ankaŭ ekzamenas la movadon por laborleĝdono kaj la rolon luditan de la sindikatoj en la klopodoj por starigi aranĝojn por plibonigi la malbonajn laborkondiĉojn en industriaj centroj. Ŝajnas, ke la klopodoj por certigi sindikatan liberecon en Norda Ĉinujo malsukcesis. Leĝoprojektoj estis prezentitaj al la multaj registaroj sinsekvintaj dum la lastaj kvin jaroj, sed senefike.

D-ro Ta Ĉen konkludas, ke, „por fortigi la labormovadon, oni devas disigi ĝin de la politiko kaj de „radikalismo", ĉar dum la lastaj jaroj, politikaj ŝanĝoj kaj komunista propagando malhelpis la laboristan aferon. Estas urĝe necese krei programon de praktikaj reformoj, bazita sur ekzistantaj sociaj kondiĉoj, kiuj vere antaŭenigos la bonstaton kaj feliĉecon de la laboristoj. Fundamenta laboro estas farota, por krei inteligentan proletarioron, kapablan por kompreni kaj saĝe uzi ĝiajn rajtojn ka privilegiojn. Ĝia socia nivelo devas esti iom post iom plialtigata, por certigi industrian pacon en la nacio".

---

## Nova Jarlibro pri Kooperaj Organizaĵoj.

La Internacia Laboroficejo publikigis novan eldonon de la Internacia Jarlibro de Kooperaj Organizaĵoj. Same kiel pli fruaj eldonoj, tiu ĉi volumo donas la plej precizajn informojn haveblajn pri:

1. Internaciaj kooperaj organizaĵoj;
2. La organizaĵoj reprezentantaj la diversajn formojn de la koopera movado en ĉiu lando.

La verko estis preparita dum 1926, kaj la sciigoj estas sekve ĝenerale tiuj eldonitaj de la organizaĵoj en 1926 kaj rilataj al la financa jaro fininta la 31-an de Decembro 1925 aŭ dum 1926.

La unua parto enhavas liston de internaciaj organizaĵoj kaj laŭlandajn listojn de pli ol 700 naciaj organizaĵoj en 44 landoj. Pri ĉiu organizaĵo, la jenaj detaloj aperas: la nomo de la organizaĵo kaj traduko de tiu en anglan, francan kaj germanan lingvojn: la adreso de la Organizaĵo, la dato de ĝia fondo, ĝiaj ĉefaj oficistoj, ĝia ĵurnalo, la nacia kaj internacia asocioj al kiuj ĝi aliĝas kaj la nombro de ĝiaj membroj laŭ la lasta raporto.

La dua raporto prezentas en tri tabeloj informojn pri la agado de la Organizaĵoj.

Tabelo I enhavas, pri ĉiu organizaĵo, la nombron da kooperaj societoj aliĝantaj, la klasojn al kiuj ili apartenas kaj iliajn respektivajn sumojn de negocoj; laŭeble ankaŭ la sumon de la vendoj faritaj de la organizaĵo, liverante al la aliĝantaj societoj aŭ komercante la produktaĵojn de ĝiaj nombroj; la valoron de ĝia propra produktado kaj la nombron da laboristoj kaj aliaj personoj okupataj.

Tabelo II donas, pri ĉiu koopera banko aŭ centra kreditinstitucio, analizon de la bilanco, la sumon de la konto de profitoj kaj perdoj, kaj la sumon de pruntoj donitaj kaj de kambioj diskontitaj dum la jaro. Pri la centraj organizaĵoj ĝi ankaŭ donas la nombron de aliĝantaj societoj kaj la sumon de iliaj bilancoj.

Tabelo III donas, pri kooperaj asekuraj societoj kaj centraj mutuaj kasoj, la nombron de asekuritoj, la sumon de la risko kovritaj, la sumon de premioj kaj de kompensoj pagitaj dum la jaro kaj la sumon de la bilanco.

